V-0851/2 (45-49)


# ESPERANTO-SERVO

AKTUALA INFORMA BULTENO DE PRAHA

Vol. 2. Nro 4 — NOVEMBRO 1949


> Ni esperantistoj servu al laboranta popolo, al progreso, al socialismo, ĉar per tio ni servas al proleta internaciismo — idea amiko de Esperanto! Adam

## BATALANTO POR LA VENKO DE LA LABORISTA KLASO




Ni rememoras la kvinan datrevenom de la heroa morto de unu el la plej grandaj filoj de la ĉeha nacio, eminenta gvidanto de la Komunista Partio de Ĉehoslovakio kaj proksima kunlaboranto de kamarado Klement Gottwald, *kamarado Jan Šverma.* La bravula persono de kamarado Jan Šverma, la entuziasma protektanto de l'plebo, kiu mortis en la batalo por la libereco, de la nacio, en la batalo por ties nova socialista vivo, fariĝas pli kaj pli multe ekzemplo por la generacio, kiu en la novaj postmilitaj kondiĉoj entuziasme laboras por konstrui la fundamentojn, de socialista socio en nia patrolando, fariĝas ekzemplo de la plej bonaj ecoj de sindonema revolucia batalanto de la laborista klaso, de batalanto, kiu kunigis veran patriotismon kaj la ĉehan nacian fieron kun revolucia internaciismo kaj profunda amo al USSR.

Kamarado Šverma estis eminenta reprezentanto de la nova generacio de laboristaj gvidantoj, kiuj por sia tasko en la revolucia movado maturiĝis en la periodo de revoluciaj bataloj post la unua mondmilito. La rusa socialista revolucio en la jaro 1917 montris al Jan Šverma same kiel al multaj aliaj anoj de tiu ĉi generacio, ke la socia ordo konstruata sur sociala kaj nacieca subpremo de la laboranta popolo, kiu pelas la naciojn al teruraj imperialismaj militoj, ne estas eterna, ke oni povas forigi ĝin per klasbatalo de la laborista klaso kaj anstataŭigi per supera, socialisma ordo socia. Tiu ĉi sperto, ĉerpita el la venko de la Granda Oktobra Revolucio, destinis la karieron de Jan Šverma, kiu, estante fervora ĉeha patrioto, atingis la konvinkon, ke sole per revolucia batalo de la laborista klaso oni povas sekurigi novan, feliĉan vivon de la nacio. La maldoĉaj spertoj el la jaroj 1918 ĝis 1920, kiuj okazigis la malvenkon de la unua impeto de l'ĉehoslovakia laborista klaso, plifirmigis la konvinkom de Šverma, ke la vojo de la ĉeha burĝaro, konstruanta la memstarecon de Ĉehoslovakio sur interligo kun la okcidenta imperialismo, preparas novan katastrofon de la nacio.

Tiuj ĉi spertoj samtempe malkaŝis la taskon de la reformismo, kiu ekiris la vojon de klasa kunlaboro kun la burĝaro. Ĉion ĉi prikonsideris la junaj revoluciaj aktivuloj, kiuj tiam kuniĝis en la Marksisma Grupo en Praha, verve diskutante, por pliklarigi la vojon de plua batalo de la klaso laborista. Krom kamaradoj R. Slánský kaj V. Kopecký distingiĝis en tiu ĉi rondo Jan Šverma kiel konsekvenca kaj senkompromisa batalanto por la principoj de la Komunista Internacio, pristrebata de Lenin kaj Stalin, por kreo de nova partio de la ĉehoslovaka laborista klaso, la Komunista Partio de Ĉehoslovakio. Ĉe la nova taksado de la historio de nia laborista movado estos grava tasko klarigi la rolon de tiu organizaĵo, el kiu elkreskis la plej proksimaj kunlaborantoj de Klement Gottwald en la batalo por nova, bolŝevisma direktigo de la KPĈ.

Karakteriza trajto de tiu ĉi rondo, en kiu partoprenis kaj eminentan lokon okupis la juna Jan Šverma, estis la fakto, ke li tuj dekomence kunligis pliklarigon de la principaj problemoj kun praktika aktiveco ĉe la organizado de la movado laborista. Jan Šverma fariĝas unu el la fondantoj de la Asocio de Komunista Junularo de Ĉehoslovakio, kiu estis kreita jam kelke da monatoj antaŭ la fondo de la Komunista Partio de Ĉehoslovakio kaj kiu sekve de sia revolucia vervo fariĝis pafcelo de bruteca persekuta militiro de la aŭtoritatoj de l'unua respubliko.

Domtraserĉoj, arestado, demandesplorado, malpermesoj de preso kaj kunvenoj — jen kiaj estis la metodoj, per kiaj la organoj de l'unua respubliko edukis la generacion de Šverma, tiun de revoluciaj aktivuloj. Sole personoj de malforta karaktero estis venkitaj per tiu ĉi militiro, por karakteroj, kia estis Jan Šverma, ĝi estis fajrobapto kondukanta al ilia hardiĝo kaj pleniganta ilin per nerepacigebla malamo kontraŭ la burĝaro kaj ties bruteca polica reĝimo. Le revoluciema junularo, plej multe persekutata per la burĝa reĝimo, moke markita per la burĝa preso kiel „la buboj el Karlín", fariĝis ĉefbatalantoj por la nova bolŝevisma linio de la KPĈ, kiun en la jaroj 1912 ĝis 1929 klopodis akceptigi kamarado Klement Gottwald.

Ĉe sia aktiva gvida agado en la Asocio de Komunista Junularo kaj en la Komunista Partio de Ĉehoslovakio kamarado Šverma eĉ ne iomete neglektis la teorian laboron kaj la teoriajn studojn. Li ne nur ekposedis profundan konon kaj komprenon de la doktrino de Lenin kaj Stalin. Tiu ĉi kreema marksano strebis detale prilabori ĉi tiun doktrinon el la vidopunkto de la spertoj de l'ĉeha laborista klaso kaj taksi la evoluon de la liberiga movado de l'ĉeha nacio el la vidopunkto de la doktrino marksismaleninisma.

Tiun ĉi taskon solvis kamarado Šverma en siaj bonegaj studaĵoj pri la jaro 1848 en Bohemio kaj per la studaĵo „La ĉeha problemo en la lumo de marksismo", en kiuj li kiel la unua metis la fundamentojn por nova marksismaleninisma taksado de la ĉeha historio. En tiuj ĉi artikoloj kamarado Šverma ne nur refutis la abomenan kalumniadon de la ĉeha burĝaro pri Karolo Marx, sed li senmaskigis ankaŭ la reakcian rolon, kiun la ĉeha burĝaro estis ludinta en la batalo por la nacia libereco. Nerefutebla konkludo, kiun Šverma deduktis el la analizo de la nacia historio, estis la konstato, ke sole la laborista klaso, kiu firme sin orientas al la granda lando de la socialismo, la Soveta Unio, kaj la frateco kun la granda rusa nacio povas por ĉiam solvi la ĉehan problemon kaj sekurigi la daŭran liberecon de la nacio en la kadro de la socialista ordo socia. Per siaj prihistoriaj disertaĵoj apartenas kamarado Šverma al la plej ĉefaj standardistoj de la nova progresema ĉehoslovaka patriotismo, kies bazo kaj firma apogo estas precipe la klaso laborista.

Kamarado Šverma, kiu en la jaro 1929 fariĝas sekve de sia senlaca batalo ĉe la flanko de kamarado Gottwald eminenta membro de la nova bolŝevisma estraro de la Partio, funkcias en la preso kaj okaze de la kunvenoj kiel nelacigebla propagandisto de tiu ĉi nova revolucia patriotismo. Senkompate li senmaskigas la reprezentantojn de la ĉeha burĝaro, kiuj post sia abomena provokado subite en la jaro 1935, kiam ilia afero estis jam kaduka, provis sin teni kiel „amikoj" de Soveta Unio. En la antaŭbalota komuniko en la halo de Lucerna la 16an de majo 1935, pli ol tri jarojn antaŭ la hontinda munhena kapitulaco de la ĉeha burĝaro, diris Jan Šverma:

„Dum pluraj jaroj batalas la sinjoroj Bechyně, Meissner kaj Beneš kontraŭ la komunismo. Ili promesis panon, laboron — ili donis al la popolo malsaton! Ili promesis paradizon sur la tero, sed ili savis per vanaj promesoj la kapitalistan ordon. La nuna situacio de la tuta laboranta popolo estas akuzo de la tuta ĝisnuna registara reĝimo.

Soveta Unio estas bastiono de la paco kaj egido de la memstareco de malgrandaj nacioj — de la nacio ĉeha. Ni komunistoj, kiuj dum pluraj jaroj malkaŝe kontraŭbatalis la politikon de Beneš, diras hodiaŭ: la bankroto de tiu ĉi politiko donas satisfakcion en la ekstera politiko de Ĉehoslovakio, por kia ni dum jaroj batalis. Ni rigardas la kontrakton inter ĈSR kaj USSR kiel grandan sukceson de la paca politiko de Soveta Unio."

Kiam en tiuj jaroj de vivoriska danĝero por la nacio kaj la Respubliko kamarado Klement Gottwald orientas la Partion al defendo de la Respubliko kontraŭ faŝismo kiel al la ĉefa tasko, kamarado Šverma fariĝas kiel ĉefredaktoro de la centra organo de l'Partio senlaca propagandisto de tiu ĉi politiko. Li publike akuzas en la preso kaj en kunvenoj la supraĵecon kaj la sendecidecon de la t. n. maldekstra parto de l'ĉeha burĝaro, predikas la neceson, ke la laborista klaso kaj ĉiuj honestaj demokratoj kaj patriotoj kunigu sin en unueca kaj popola fronto por defendo de la Respubliko:

„Kiel komunistoj, kiuj tiom bone konas nian propran burĝaron, ni diras malkaŝe al la laboranta popolo: Atentu la ĉehan burĝaron!

Ne la burĝaro, sed la laboranta popolo sub gvido de la komunista partio estas garantio de la memstareco de l'ĉeha nacio kaj garantio de la amikeco al USSR!"

La hontinda perfido de la ĉeha burĝaro, kiu en septembro 1938 kapitulacas kaj fordonas ĉi-maniere sen batalo al Hitler la Respublikon, konfirmas tiun avertan voĉon. En la artikolo de „Světové rozhledy" (Tutmonda Revuo), en kiu kamarado Šverma taksas la taskon de la ĉeha burĝaro en la tagoj de Munheno, li skribis:

„La ĉeha nacio estas nun sklavigita. Tamen ĝia spirito ne estas fleksita. Ju pli bruteca estas la perforto de la okupaciantoj, des pli hontinda estas la perfido de multaj ĉehaj politikaj reprezentantoj, kiuj hodiaŭ sin disponigis al la germana faŝismo kontraŭ la propra nacio, ju pli granda estas la ekspluatado kaj la mizero de ĉiuj tavoloj de la laboranta popolo, des pli decida estas ties volo batali por faligi la germanan superregon kaj por rekonkeri la nacian memstarecon. La suferigaj spertoj el la septembraj okazaĵoj de la jaro 1938 kaj el la martaj de la jaro 1939 — la perfido de la kapitalista reakcio kaj la kapitulacemo de ĉiuj burĝaj kaj socialistaj gvidantoj — klare montras, ke sole la klaso laborista estas kompetenta kaj kapabla direkti la batalon de la nacio por ties liberigo."

La batalo por la reakiro de la nacia memstareco sub gvido de la klaso laborista, jen la linio, kiun tuj post la munhena kapitulaco montras al la nacio la Komunista Partio de Ĉehoslovakio gvidata de Klement Gottwald. En la jaroj de la milito, en Moskvo, Jan Šverma fariĝas membro de la plej intima rondo da kunlaborantoj de kamarado Gottwald, kiu ĉi tiun linion detale prilaboras kaj defendas kontraŭ la perfida politiko de la londonaj elmigrulaj rondoj, kunligantaj la sorton de la Respubliko kun la okcidenta imperialismo kaj tiamaniere preparantaj por post la milito novan imperialisman sklavigon de la laboranta popolo de Ĉehoslovakio. Kontraŭ tiu ĉi perfida orientado kamarado Šverma defendas firman kaj nedisigeblan amikecon de Ĉehoslovakio kun la granda Soveta Unio, kaj ĉe la flanko de Klement Gottwald li orientas la popolon al renovigo de la nacia libereco ne plu en la kadro de burĝa demokratia respubliko, sed de nova respubliko popol-demokratia, en kiu la gvidan rolon ludas la klaso laborista.

Kiel la tuta vivo de Jan Šverma estas karakterizata per nedisigebla kunligo de revolucia teorio kun praktika revolucia agado, tion atestas ankaŭ lia heroa morto en la montaro de Slovakio. Tuj post kiam venis sciigoj pri la Slovakia Ribelo, li ne lasis sin reteni kaj forflugis en la nokto inter la 27a kaj la 28a de septembro tra super du frontoj en la flughavenon Tri Duby apud Zvolen, por kiel grava ĉehoslovaka faktoro partopreni en la liberiga movado en Slovakio kaj poste ankaŭ en la batalo partizana. Tie li sur slovaka tero per sia morto konfirmis la fratecan ligon de ambaŭ niaj nacioj, al kiu li estis doninta per sia koncepto de nova frateca rilato inter la ĉeha kaj slovaka nacioj fidindan kaj fortikan fundamenton."

Ĉi tiel karakterizas la plej proksima amiko kaj kunbatalanto de J. Šverma, la centra sekretario de nia Partio kamarado R. Slánský, la lastan fazon de la heroa vivo de Jan Šverma en la enkonduko por la eldono de lia kompleta verkaro.

Per sia tuta kariero, en kiu li nedisigeble kunligis la batalon por la granda doktrino de Lenin kaj Stalin kun sindona revolucia laboro, restas Jan Šverma eterna ekzemplo por konstruantoj de nova socialista Ĉehoslovakio, kiu, same kiel por tio batalis J. Šverma, ĉe la flanko de la granda Soveta Unio sekurigas daŭran liberecon kaj feliĉan vivon de niaj nacioj.



## DE KLEMENT GOTTWALD NI LERNU

*sentiman batalemon por la distingita vero,*
*konscion pri klara celo,*
*rektecon kaj nedeflankiĝecon de la alcela vojo,*
*persistemon kaj honestan laboristan memkonfidon,*
*simplecon kaj klarecon de la vorto*
*kaj la el tio rezultantan konvinkecon,*
*personan modestecon kaj ekvilibron eĉ sur gvidanta posteno,*
*ŝtatistan arton de pripensemo, disciplino kaj firmeco!*

*Marie Majerová.*

La 23an de novembro 1949 rememoris la tuta ĉehoslovaka popolo la 53an naskiĝotagon de sia multmerita respublikestro Klement Gottwald, kiu personigas la grandiozajn prosperigajn ŝanĝojn sur la kampoj ekonomia, sociala kaj politika, ĉe ni realiĝintajn. La signifplena tago ne estis solenata en pompa maniero, sed per ĉiurilate pliintensigita laboro kaj per multnombraj sindevigaj promesoj, koncernantaj la ŝtatkonstruan strebadon.

### TELEGRAMO AL RESPUBLIKESTRO KLEMENT GOTTWALD.

Ni, la Regiona Nacia Komitato kaj la Unueca Nacia Komitato en Hradec Králové, en nia hodiaŭa solena kunsido, en kiu ni proklamas la ĉi-jarajn Tagojn de Ĉehoslovaka-Soveta Amikeco, dankeme rememoras vian grandan laboron ĉe la konstruado de neŝancela amikeco kaj fidela alianco de nia Respubliko kun la nevenkebla Soveta Unio.

Dum la tuta tempo de via politika agado vi ĉiam montris, ke USSR estas la forto, sur kiu sin povas apogi la libereco kaj sendependeco de Ĉehoslovakio. Ni konsciigas al ni precipe en la nuna momento, ke vi estas la ĉefa kreinto de la firmaj kaj nedetrueblaj fundamentoj de nia nacia kaj ŝtata vivo, kiujn starigis la moskva kontrakto el la 12a de decembro 1943, la kontrakto pri amikeco, reciproka helpo kaj kunlaboro de ĈSR kun USSR.

Goje rememorante vian menciitan konstruan laboron por la nacio, ni dankas vin pro ĝi je la nomo de nia tuta popolo kaj promesas kune kun vi: La fidelan amikecon kun Soveta Unio ni konservos por eterne.

### ONI SOLENOS LA NASKIĜOTAGON DE GENERALISIMO STALIN.

La laboruloj de la tuta Ĉehoslovakio preparas dignajn solenojn al la naskiĝotago de generalisimo Stalin. La enhavo de la solenoj estas plej bone karakterizata per unu el la devizoj: „Kun Stalin por paco, socialismo kaj feliĉo de la ĉehoslovaka popolo." Paralele kun la solenoj oni instalos en la lernejoj kaj en ĉiuj grandaj stacidomoj ekspoziciojn pri Stalin, kiuj ilustros la vivon kaj verkon de generalisimo Stalin kaj ties signifon por feliĉa disvolviĝo de Ĉehoslovakio. La saman temon pritraktos multaj paroladoj kaj kino- kaj teatro-prezentadoj. La solenoj kulminos en meto de la fundamenta ŝtono el ĉiuj regionoj de la Respubliko por monumento de Stalin en Praha en la naskiĝotago, la 21an de decembro.

dz/91

# ALVOKO DE LA PREZIDANTO DE LA RESPUBLIKO KLEMENT GOTTWALD OKAZE DE LA MALFERMO DE LA TAGOJ DE ĈEĤOSLOVAKA-SOVETA AMIKECO

Karaj samcivitanoj, gekamaradoj!

Antaŭ kelke da tagoj mi parolis al vi okaze de nia Nacia kaj Ŝtata Festo, la datreveno de la naskiĝo de Ĉeĥoslovaka Respubliko. Hodiaŭ mi refoje turnas min al vi. Mi faras tion, ĉar hodiaŭ ni malfermas grandan entreprenon, nome la Tagojn de Ĉeĥoslovaka-Soveta Amikeco.

Tiuj ĉi Tagoj, kiuj senpere interkontaktas kun la soleno de nia Nacia Festo, kulminos en majesta soleno de la Sepa de Novembro, la 32a datreveno de la Granda Oktobra Revolucio Socialista. La datrevenon de l'naskiĝo de la Soveta Ŝtato solenos nia popolo ne malpli entuziasme kaj sponte ol sian propran Nacian Feston. Kaj tiu ĉi fakto estas neniel mirinda.

Tre profunde jam penetris en la konscion de nia popolo la agnosko de la historia fakto, ke sen la Sepa de Novembro 1917, sen la venko de la Oktobra Revolucio, ne estus okazinta eĉ nia Dudek-oka de Oktobro 1918, ne ekzistus Ĉeĥoslovaka Respubliko. Definitive pereis la falsa historia fikcio, kvazaŭ la okcidentaj potencoj post la unua mondmilito libervole, por tieldire belmienigi la ĉeĥojn kaj la slovakojn, estus kreintaj la Ĉeĥoslovakan Ŝtaton. Male: venkis la historia vero, ke sub influo de la Oktobra Revolucio, sub influo de la alarmanta lenina devizo de tiu ĉi Oktobra Revolucio — la devizo pri liberigo kaj memdestino de la nacioj — la revolucia movado de vastaj amasoj da ĉeĥoslovaka laborula popolo naskis Ĉeĥoslovakan Respublikon.

La datrevenon de la Granda Oktobro solenas nia popolo ĉiujare kiel sian propran Nacian Feston due pro tio, ke, se ne ekzistus la potenca Soveta Unio kaj ties glora Soveta Armeo — la Liberiga Armeo —, ne estus perfekte malvenkita la hitlera faŝismo en la dua mondmilito, kaj sekve ne ekzistus la renovigo de Ĉeĥoslovaka Ŝtato, detruita kaŭze de la malnobla perfido, pri kiu kulpiĝis la okcidentaj potencoj en Munheno.

Fine ni solenas la Sepan de Novembro kune kun la frataj nacioj sovetaj kaj same ĝoje kiel ili, ĉar hodiaŭ jam por ĉiu estas evidenta la fakto, ke, se ne ekzistus la potenca protekto de la alianca Soveta Unio, nia laborula popolo ne estus povinta elŝiri la potencon el la manoj de la antaŭaj ekspluatistoj, ekpreni la direktilon de la Ŝtato, surtronigi la ordon de la popoldemokratio kaj komenci sukcesplene konstrui socialismon en sia lando.

Niaj spertoj kaj la spertoj de niaj amikoj el la ceteraj popol-demokratiaj landoj, same kiel la fortimiga ekzemplo de Jugoslavio, konvinkas nin ĉiam pli multe pri tio, ke sen Soveta Unio, sen ties potenca protekto, sen ties granda modelo, kaj precipe sen ties konstanta politika kaj ekonomia helpo tute ne estus eble sekurigi la sendependencon kaj la suverenecon de niaj ŝtatoj, kaj des malpli konstrui en ili socialismon.

La samtempa evoluo de la internacia situacio devas konvinki pri tio eĉ la lastan nekredeman Tomason, kondiĉe ke li volas lasi sin konvinki. En okcidento, en landoj, kiuj estis feliĉigitaj per la „bonfaro" de la Marshall-Plano, ni vidas kreskantan ekonomian ruiniĝon kaj fantomon de granda krizo surhorizonte, kun senlaboreco kaj mizero de vastaj laborulaj tavoloj, same kiel ankaŭ la degradiĝon de tiuj ĉi landoj je nuraj satelitoj de usonaj monopolistoj. Ni kaj la ceteraj popol-demokratiaj landoj ĝentile rifuzis la marshallismajn delogojn kaj restis trankvilaj ankaŭ kontraŭ la minacoj de la per-atomaj ĉantaĝistoj, Dank' al la malegoista helpo kaj sekuriga egido de Soveta Unio ni kviete laboras, konstruas, laŭsisteme plialtigas la vivnivelon de la tuta popolo kaj atendas sentime la estontecon, en firma konvinko, ke nian celon, la socialismon, ni nepre atingos. La historio de la militprovokistoj kaj de la restoj de ties reakciemaj disĉiploj nialandaj frakasiĝas kontraŭ nia memkonfida trankvileco. La fonto de la dirita memkonfido kaj de nia fido al la granda kaj ĝojiga estonteco de niaj nacioj estas antaŭ ĉio la nevenkebla potenco de Soveta Unio kaj la ĉiutage pliĝanta forto de la kontraŭimperialisma tendaro, kies animo, kolono kaj ĉefa apogo estas la unua grandpotenco de socialismo — Soveta Unio.

Jen kial nia popolo ĝuste ĉi-jare sin preparas por grandioze soleni la Sepan de Novembro. Sed la fakto, ke ĉi-jare preskaŭ la tuta novembro staros sub la signo de la ĉeĥoslovaka-soveta amikeco, havas ankoraŭ pluajn motivojn.

En tiuj ĉi tagoj ni volas ne nur esprimi nian senfinan dankon, niajn ardan amon kaj sindonemon al la lando de socialismo kaj ties popolo pro ĉio, kion ili faris por ni, kion ili por ni signifas kaj kion ni ŝuldas al ili.

Ni volas, ke en la intereso de plua plifirmigo de nia sekureco kaj de la paco nia tuta popolo fariĝu konvinkita kaj aktiva subportanto de la ĉeĥoslovaka-soveta amikeco kaj de la plej intima kunlaboro kun Soveta Unio.

Ni volas, ke sur la sojlo de la dua jaro de nia Kvinjara Plano, kiu al ni diktas taskojn ĉiam plj respondecajn, nia tuta popolo alpropriĝu al si nepenseblajn spertojn pri la konstruado de socialismo en Soveta Unio. Estas ja memkompreneble, ke nur tiam, se ni alpropriĝos al ni tiujn ĉi spertojn en ĉiuj fakoj de la ekonomia kaj kultura konstruado, ni tenos en niaj manoj kompason, kiu nin laŭ la plej mallonga vojo, sen nenecesaj eraroj kaj ĉirkaŭvagoj, ĝiskondukos al nia celo, al socialismo. Tial la Tagoj de Ĉeĥoslovaka-Soveta Amikeco estos antaŭ ĉio tagoj de intensa kleriĝado, sininformado pri la soveta realeco. Fidinda rimedo por tio estas nekontesteble amasa lernado de la rusa lingvo, kiu malfermos por centmiloj da membroj de nia popolo pordegojn al la socialista kulturo, al teknika, scienca kaj beletra literaturoj.

Samtempe kun la Tagoj de Ĉeĥoslovaka-Soveta Amikeco ni malfermas la subskriban kampanjon okaze de la 70a naskiĝotago de nia plej bona amiko kaj instruanto, kamarado Stalin. Mi estas konvinkita, ke oni trovos eĉ ne unu honestan civitanon de nia Respubliko, eĉ ne unu ĉeĥan kaj slovakan patrioton, kiu per sia subskribo sur la salutletero de la ĉeĥoslovaka popolo ne esprimus al nia liberiginto kaj protektanto, al la granda Stalin, profundajn dankon, amon, ŝuldatecon kaj deziron, ke li ankoraŭ multjare en sano kaj freŝeco direktu la konstruadon de komunismo en Soveta Unio kaj gvidu la laborulan popolon de la tuta mondo en la batalo por daŭraj paco, socialismo kaj sendependeco de la nacioj.

*Plue plifirmiĝu kaj pliintensiĝu la frateco inter la nacioj de Ĉeĥoslovakio kaj Soveta Unio!*

*Eterne vivu, floru kaj kresku nia aliancano, la garantianto de la libereco kaj socialista estonteco de nia patrolando — Soveta Unio!*

*Longe vivu kaj estu sana la amata gvidanto de la laboruloj de l'tuta mondo — kamarado Stalin!*



## VERKISTO JORGE AMADO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Ĉeĥoslovakio fariĝis lastatempe rifuĝejo al multaj progresemaj homoj el diversaj landoj. Vivas ĉi tie ankaŭ la brazila progresema verkisto Jorge Amado, kiu devinte forlasi sian patrujon vivis en Parizo, de kie li estis kun sia familio eksigita pro sia kontakto kun la progresemaj rondoj de la Latina Ameriko. Amado kun sia familio trovis novan hejmon ĉe ni en Ĉeĥoslovakio kaj liaj verkoj estas tradukataj al ĉeĥa lingvo. Jam oni eldonis la verkojn „El mar muerto" (Morta maro), „Carlos Prestes" kaj „Jubiabá". En ĉiuj liaj verkoj, la problemoj socialaj estas la ĉefa objekto. Amado batalas aktive por la rajtoj de sia popolo kaj tial li estis persekutita. Veran liberecon li trovis en Ĉeĥoslovakio kaj li kunlaboras kun progresemaj homoj de nia lando. En Praha, en la novembra kunveno de la amikoj de respublika Hispanio, li prelegis pri la batalo al paco en Latina Ameriko. Amado tuj komence de sia parolado akcentis, ke la paco estas por la Latina Ameriko la vivodecida demando. La milito, kiun volas imperialistoj komenci, signifus por la sud-amerikaj landoj denove pligrandan koloniadon kaj likvidadon ja eĉ de tiuj restoj de la suvereneco, kiuj ekzistis ĝis nun. Niaj nacioj — diris Amado — reprezentas la rezervojn de nordamerika imperialismo, sed tamen ili estas rezervoj ne certaj. Kiam hitlerismo fariĝis la plej furioza malamiko de la homaro, tiam rekte pro subpremado suferis la eŭropaj nacioj. Hodiaŭ, kiam al la homaro la malamiko nro 1. fariĝas la amerika imperialismo, ĝia sovaĝeco plej brute kaj plej senkaŝe vidiĝas sin en la Latina Ameriko. La ne multon, kion ni posedas en la industrio, la imperialismo detruis — diris Amado. En ŝtato San Paolo, en mia gepatra Brazilo, estis en la pasinta jaro 80.000 laboristoj el teksa sektoro sen la okupo. La usonanoj superŝutis niajn merkatojn per japana varo, kiu estas pli malkara ol niaj produktoj en San Paolo. Libroeldonejoj estas sisteme ruinigataj, ĉar el Hispanio de Franco kaj el USONA estas importataj portugalaj libroj, kiuj estas malplimulte kostaj ol la libroj eldonataj en tiuj ĉi landoj. Per tio ili ne sole ruinigas niajn eldonejojn, sed samtempe ili importas literaturon, kiu estas danĝera al nia junularo. En la ministrioj — daŭrigas Amado — estas definitivaj usonaj „komisiitoj", kiuj fakte direktas la laboron de tiuj organoj, kiujn oni nomas „la oficoj de suverena registaro". La imperialista hegemonio en la Latina Ameriko estas cinika, bruteca kaj ĝi senkompate forigas kion ajn aŭ kiun ajn, kio staras en la vojo. La brazila ministro de eksteraj publike proklamis, ke „estas necese ŝanĝi la koncepton de la suvereneco, kiun ni heredis de niaj antaŭuloj — de la portugalaj koloniintoj." Nia petrolo, nia kompatinda industrio, nia natur-riĉajoj, nia mizerigita juneco, tion ĉion enhavas la imperialistoj en siaj krimulaj planoj. Ni estas la rezervoj de ili, sed tute certe kun ili kalkuli oni ne povas. Dum la Tutamerika pac-konferenco, kiu okazis en septembro 1949 en Meksiko, kunvenis la nacioj de Latina Ameriko, por diri sian „NE" pri la milito kontraŭ Sovet-Unio kaj kontraŭ novaj popoldemokratioj, kaj ili manifestis sian fortan volon: ne uzi la armilojn, ja eble nur kontraŭ siaj subpremantoj kaj imperialistaj sklavigantoj. Jorge Amado vidigis multajn dokumentajn faktojn pri la bataloj al paco de la nacioj el Latina Ameriko, pri batalaj heroaj, precipe kiam ni konsideras, ke imperialismo uzas al la subpremado tiajn tipojn, kia estas Videla kaj Dutro, kiuj ne sentas abomenon uzadi la plej sangoplenan teroron por detrui la progreseman movadon. Sed tiuj ĉi metodoj — diris la aŭtoro de „Carlos Prestes" (Viro de la espero, kiu por la latina amerika popolo estas la dua Lenin) — ne povas malebligi, ke la nacioj de Latina Ameriko ne batalu man-enmane kun fratoj sur la tuta mondo, kontraŭ la milito, kontraŭ imperialismo, al demokratio, al kvalitaj salajroj, al sendependeco de la nacioj en la tendaro de paco, kiun frontestaras Sovet-Unio kaj nia instruisto — Stalin.

# JAROSLAV HAŠEK, AŬTORO DE LA „BRAVA SOLDATO ŠVEJK"

Kiam oni eldiras antaŭ iu la nomon Hašek kaj aldonas la vorton Švejk, certe tre multaj vizaĝoj ekridas. Certe ankaŭ pluraj el vi ekridetas, karaj legantoj, ĉar la libro de Hašek „La brava soldato Švejk" estis tradukita en ĉiujn eŭropajn lingvojn, en Esperanton kaj nun ĝi aperas japane helpe de la Esperanta traduko. Ĝi tuj trovis plaĉon de ĉiu leganto. La ĉeĥa verkisto Jaroslav Hašek kreis en la libro individuan tipon de sagaca idioto en la bona vortosenco, tipon same akrakonturan, kiaj estas ekz. Oblomov, Raskolnikov, Faust aŭ Hamlet. Švejk estas infano de la epoko ĉirkaŭ la unua mondmilito, infano ribelema. Pere de lia buŝo Hašek disbatas la falsan glornimbon de la granda buŝa burĝa heroismo kaj de ĉio tio, kion la potenculoj bezonas, por ke la simpla popolo emu iri sur la buĉejon kaj batali por fremdaj interesoj, ĉu la potenculoj estas prusaj militaristoj aŭ usonaj imperialistoj. Legante Švejkon, oni devas bone konscii ĝuste pri la tempo de lia kreiĝo, precipe pro tio, ke li estis konsiderata siatempe kiel la prototipo de la ĉeĥa karaktero. Nuntempe oni vidas, ke tiu konjekto ne estas prava. Švejk reprezentis per sia persono la rezistadon de la ĉeĥa popolo kontraŭ la habsburga monarkio kaj dekadenco de la burĝaro. Kun ilia forigo ĉesis ankaŭ praveco de ĉi tiu tipo. Sekve de tio la švejkaj trajtoj malaperis en la pasinteco, kiu ilin naskis, ĉar ili perdis sian ekzistrajton.

Jaroslav Hašek naskiĝis en Praha 24. 4. 1883. Lia vivo similas al multkolora kalejdoskopo, tra kiu esprimriĉe kuras kvazaŭ ruĝa fadeno plenkonscienco en verkado, por kiu li ĉerpas el sia senpera kono pri la medio kaj el sia amo al la laboranta homo. La samtempuloj kaj amikoj de Hašek desegnas lin en siaj rememoroj kiel homon kun mirakla memoro kaj genia talento, sed ankaŭ homon kun tro amo al glaso da biero aŭ vino. Antaŭ la unua mondmilito, Jar. Hašek havis sinsekve tre multajn okupojn, sed li ekankris en neniu el ili. Li klopodis ekkoni ĉiam novan medion, li multe vojaĝis, ne estis ĝ nata per dormo en stalo aŭ en fojno-amaso. Li volis travivi ĉion, pri kio li verkis. Li kontaktis kun vaguloj, kun perditaj ekzistajoj, kiujn la burĝa socio elĵetis el sia mezo. Hašek vidis en ili antaŭ ĉio homojn kaj pro tio ilia maldelikata konduto ne ĝenis lin. Tie li ĉerpis la temojn por siaj sennombraj rakontoj. Li verkis dum sia vivo pli ol 500 tiajn noveloin. La personoj de Hašek karakterizis, eble plej bele, lia edzino Jarmila, per la vortoj: „La honesteco de la laboro de Hašek estas en tio, ke li malsupreniris pro sia arto ĝis la nivelo de siaj tipoj, por ekkompreni ilian rilaton al la homoj kaj ajoj. Li oferis sin mem, la patrinon, edzinon, amikojn — li metis ĉion, kion li havis, sur la altaron de la vero kaj tiu ĉi vero pri la samtempa vivo de la burĝa socio aperis antaŭ li ridinde kripla, sen ornamoj, sen vualo.

Do la vivo mem estas por Hašek la fundamento de la verkista metio. En siaj noveloj li martelas kaj senkompate mokas la etburĝecon, martelas la putran aŭstri-hungaran monarkion. La polica direkcio en Praha plurfoje ne sciis plu, kion fari pri li. La arto estis batalo por Hašek. Li skribis pri tio: „Jes, ankaŭ en la arto devas manifestiĝi batalo. Hodiaŭ, la devo de la artisto estas batali per montrado de la vero kontraŭ la obskuraj potencoj, superregantaj la homaron kiel gregon da brutoj." Kaj plu: „Mi kredas, ke la arto fariĝos en proksima tempo potenca faktoro. Kaj la plej bezonataj estos la artistoj, kiuj montros grandan, homan vivokoncepton kaj sekvos senskrupule la veron".

Kiam ekflagris la unua mondmilito, Hašek estis vokita en la armeon de la aŭstria imperiestro. Li rekrutiĝis laŭdire en blanka rajdista pantalono, en jaketo, ruĝa vesto kaj pelerino. Kaj ĉar estis manko de la uniformoj, li iradis ankaŭ sur la ekzercejon en tiu ĉi groteska kvazaŭuniformo, kompletigita per fusilo kaj pipo en la buŝo. Pro sia konduto li estis eligita de la oficirlernejo kaj sendita en la rusan fronton. Tie li transkuris en kaptitecon, kaj partoprenis la oficialan ĉeĥoslovakan rezistbatalon. Sed ankaŭ tie li ne eltenis longe. Li ekkonis de tro proksime la fian politikon de Gajda, Žák kaj Prchala kaj de aliaj oficiroj de la ĉeĥoslovakaj legioj, kiuj favoris la blankgvardianojn (caranojn) kaj instigadis simplajn legianojn en batalon kontraŭ la soveta Rusio. Hašek aliĝis al la Ruĝa Armeo, laboris en la komunista movado kaj estis eĉ dum certa tempo komisaro en iu gubernio. Estas interese, ke tiam li ĉesis drinki. En la j. 1920 li revenis en la patrujon. Kaj li komencis vivi la saman vivon kiel antaŭ la milito. Li denove mokas la tutan mondon, nur unu aferon ne — la komunismon kaj sian vivon en Rusio. Li komencas verki sian nemorteblan Švejk, sed meze de tiu laboro trafis lin la morto. La 3an de januaro 1923 en Lipnice apud Havlíčkův Brod tiu ĉi senmorta kunulo de Cervantes, genia humoristo, mortas. — Sed la „Bona soldato Švejk" vivas kaj per idiote saĝa rideto alvokas batali kontraŭ la milito, batali por la vivo.

La eldonado de E. S. estis interrompita pro malsano de la redaktoro kaj pro teknika kaŭzo. De nun ĝi aperados regule. Ni petas la pardonon de niaj legantoj.

Redakcio de E. S.

Ĉiujn dezirojn kaj proponojn bonvolu adresi al: „Esperanto-Servo". Praha II, Malá Štěpánská 7, Ĉeĥoslovakio. telef.: 330-14. Eldonas: Instituto de Esperanto-Servo-Praha. Responda reprezentanto de Esperanto-Servo: A. Malík, Presis: Státní tiskárna (Ŝtata presejo), Praha, Ĉeĥoslovakio.